# Uzo de refleksivo (2)

Vi memoras, ke **sin** (**al si, por si**, **pri si,…)** estas uzata por la reveno al la subjekto. Kion fari se, en la frazo, estas du "aktoroj"?

En tiu kazo, oni uzas **sin** (**al si**, **por si** , **pri si**,…) por la reveno al *la koncerna"aktoro"* de la *koncerna ago*

=====================================================

**Ekzemplo:**

La patro vidas la filon , kiu *provizas* **sin** je kukoj



Alia maniero

La patro vidas la filon,
kiu *prenas* **por si** la kukojn.

La verbo povas esti en pluraj formoj

<u>Infinitiva</u>
La patro malpermesas la filon *provizi* **sin** je kukoj
La pato malpermesas la filon *preni* **por si** la kukojn

<u>Aktiva participo</u>
La patro vidas la filon *provizantan* **sin** je kukoj
La patro vidas la filon *prenantan* **por si** la kukojn

Aliaj ekzemploj kun la koncerna aktoro en plurala formo
La patro vidas **la filojn** , kiuj provizas **sin** je kukoj
kiuj prenas **por si** la kukojn
provizantajn **sin** je kukoj
prenantajn **por si** la kukojn

NOTO:

Kvankam ne estas verba formo , sed adjektiva formo, tute logike oni povas uzi **al si, pri si, kontraŭ si**, … post la *adjektivoj kiuj esprimas sentojn.*

Oni povas esti:

*kolera* **kontraŭ si**
*fiera* **pri si**
*honta* **pri si**
*kontenta* **pri si**
*ĝoja* **pri si**
*indulga* **al si,** ….

==========================================

La patro renkontas la filon *fieran* **pri si.**

